pdf. **iompostiom**.net **005**

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj kluboj

Tutmonde

La 7-a Tutlanda Handikapula Sportkunveno de Ĉinio

Legu la plenan artikolon en raporto.info

Vespere de la 12-a de majo inaŭguriĝis en Kunming, Yunnan-provinco, la 7-a Tutlanda Handikapula Sportkunveno de Ĉinio. Ĝi konsistas el atletiko, naĝado, halterlevo, pafado kaj aliaj 16 disciplinoj. En la sportkunveno el la plej multaj disciplinoj kaj kun la plej multnombraj sportistoj en la historio, partoprenis pli ol 3000 sportistoj de 35 delegacioj el 31 provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj, la Produkta kaj Konstrua Korpuso de Xinjiang, Hongkong kaj Makao. En la 13-20-a la konkursoj okazas en Kunming kaj alia urbo Yuxi.

Instrue

Kaj... kaj

Legu pli en http://bertilow.com/pmeg

Duobla **kaj** estas uzata por emfazi kaj insisti. Oni tiam metas **kaj** antaŭ ĉiuj kunligitaj aferoj, ankaŭ antaŭ la unua. Parole oni tiam normale emfaze akcentas je **kaj**:

- *Kaj Petro kaj Karlo laboras.* Insisto pri tio, ke ne nur unu sed fakte ambaŭ laboras.
- *Kaj pluvas kaj blovas.* Insisto pri tio, ke ambaŭ agoj okazas.
- *Petro kaj fumas kaj drinkas.* Insisto, ke li fakte faras ambaŭ agojn.
- *Kaj ilia amo, kaj ilia malamo, kaj ilia ĵaluzo jam de longe malaperis.*[Pr.9] Insisto, ke ĉiuj tri aferoj malaperis.

Junule

IS en Würzburg (Germanio)

Legu la plenan artikolon en tejo.org

Komenco: 2007-12-27 14:00
Fino: 2008-01-03 12:00
Tempozono: Etc/GMT+2

Kun ŝaŭmvino silvestre, kaj kokteloj alvene, nokte kaj tage vi povos frimozi kun alilandaj amikoj en la drinkejo, diskejo, gufujo, ludejo, programejoj, ekskursetoj...

Nova estro, kaj renovigita teamo alportos al vi la 51-an Internacian Seminarion kun tradicie Esperanta etoso, kaj eblecoj mem envolviĝi kaj kontribui al via Internacia Seminario.

Proverbe

Vi povas abunde trovi proverbojn en lernu.net

Proverboj pri abundo

- Kie pano estas, tie musoj ne mankas.
- Kiom la koro deziras.
- Malfermita kelo tentas al ŝtelo.
- Plena kaso ŝteliston altiras.
- Tro sata, tro bata.

Ĉu vi scias proverbon kaj rakonton el la praktiko ĉe tiu proverbo? Sendu tion do tuj al ikojba@gmail.com, menciante ke via kontribuo estas por la iompostiom-gazeteto.